
# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k62.htm http://www.iespana.es/esperanto/k62.htm




Nro 62a Aprilo/junio 2004

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marín Esparta, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*

**ISSN 1697-6460**

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***konto*** *nº* ***2100-4455-71-0200055454.*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Miguel Gutiérrez Adúriz,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***Sennaciulo***, de Kreŝimir Barkoviĉ,
6 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
7 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
8 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
9 ***Litova Stelo***, de Petras Ĉielauskas,
10 ***Laŭte!***, de C. Baudé,
11 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
12 ***Juna Penso***, de Vinko Markov,
13 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
14 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
15 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



**Kovrilo**: Korkara amiko, Prezidinto kaj kasisto de HALE, kamarado José María Bernabéu Franco mortis la lastan monaton. Li ĉiam estos kun ni.

# Enhavo

Redaktore ........ 3
Informoj de la prezidanto ........ 4
Profilo de imitinda esperantisto ........ 5
La tago plej longa ........ 10
Centraj paĝoj ........ 12
Preter manifestacioj ........ 14
La 15-a Kongreso de la VEF ........ 15
Strategiaj proponoj ........ 16
Kontraŭ ***La mitoj pri la Intercivitana Milito*** ........ 18
Mel Gibson, kiu estas en ĉielo ........ 20
Projekto *Pioniroj* ........ 21
Enkonduko en muzikon: Frank Sinatra ........ 22
Se ........ 23
Surprizo en la reto! ........ 24

Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Redaktore

***Kajeroj el la Sudo*** funebras la perdon de elstara esperantisto, ano de HALE kaj bona homo**.** Ĉio alia povas esti problemo solvebla, sed ne plu eblos viziti nian amikon je Callosa de Segura, ne vane morto estas la sola nesolvebla problemo.



José María Bernabéu Franco estis la unua Prezidanto de nia asocio, kaj li ĉiam rilatis al HALE. Li estis bona homo, kies helpon oni ja povis prikalkuli. Li estis laste kasisto ĉe ni. Kiam komencis problemoj, li estis kritika al ni, sed kiam li vere konsciis pri kio la afero temis, li vere apogis nin. Kiam li lernis pri nia projekto ***Gazetoteko Lanti***, li faciligis la aferon al mi, kaj havigis sian privatan gazetotekon por ke mi prenu ĉion, kion mi bezonu pri tiu iniciato.

Kelkaj monatoj antaŭ sia morto, li respondis intervjuon ĉe si, kiun ni publikigas en la venontaj paĝoj, tiel montrante sintenon sian. Ankaŭ li publikigis je niaj paĝoj artikoleton pri samurbanino de Callosa del Segura je numero 33-a (“Malaperinta laborista familio el Kaljosa el Segur””), en januaro de 1997. Pri aliaj aferoj de sia vivo ni parolis, kaj vi legos je paĝo 5-a.

Li longe vivu je niaj memoro kaj koroj, kvankam vivo daŭrigas, kaj estas aliaj aferoj, kiujn oni devas pritrakti. Kaj ne estas neglektebla tiu, ke kelkaj anoj de SAT deziras nuligi tiun rolon, kiun nia asocio havas kiel LEAo. Kvankam la afero estas grava, ni nur informas pri ĝi koncize. La venontan numeron ni ankaŭ montros al HALEanaro nian reagon. Sed nune ni estimas, ke ĉio konsistas el komplika miskompreno, kaj ni esperas, ke la afero solviĝos favore baldaŭ.

Aliflanke, estas la afero de la milito de Irako kaj la ŝanĝo pri la registaro de Hispanio. Tio ankaŭ estas grava afero, kiu vere influos nian nuntempan historion pli ol oni povas imagi. Oni scias, ke je ĉiu milito, vero estas la unua perdo, kaj oni atestas ĉiun tagon, ke niaj amaskomunikiloj kaŝas gravajn aspektojn pri tio, kio okazas. Oni troigas kelkajn detalojn, dum ke silentas aliajn. Dirinte pri ili al kelkaj amikoj, ili reagas, dirante, ke ili *ne deziras aŭskulti tion*. Tia civitanaro, tia amaskomunikiloj!

Ĉijare estas la sesdeka datreveno de la invado de Normandio fare de la usona armeo. Neniu plendo pri tio, tamen, eĉ se tio estis la sola afero, kiu malebligis Ŝtalinon konkeri la Okcidentan Eŭopon, kiam konkerante la orientan parton de Germanio, la Ruĝa Armeo de Sovetunio trovis la usonajn soldatojn. Tiuj ĉi ne havis tiom multe da tankoj, sed ili jam havis la Atombombon, alidirite la *bombo de paco* pro tio, ke la milito *malvarmiĝis* dum kvindek jaroj pro ĝi.

Ni estas, kaj ĉiam estos, kontraŭ cenzuro kaj arbitraciaj decidoj. Pro tio ni havas la plezuron publikigi la artikolojn de José Luis Pérez Óvilo, kiuj estis cenzuritaj de ĵurnaloj lokaj de Mursjo, ***La verdad*** (la vero) kaj ***La opinio*** (la opinión), nomoj ŝajne mokeskaj...

La lasta parto de la *Enkonduko en muzikon* temas pri grava kantisto Frank Sinatro, alidirite *La voĉo* pro la beleco de lia kanto. Mi esperas, ke ĉi tiu numero plaĉu al vi.

# Informoj de la prezidanto

Estimataj HALEanoj kaj legantoj de la Revuo ***Kajeroj el la Sudo***!

Normale la parolado de la Prezidanto estas parolado pri sukceso, atingo aŭ kuraĝigo, kio estas devo de persono kun grava posteno ĉe institucio aŭ asocio.



Sed tiun ĉi fojon mi, kiel Prezidanto ne povas fari same, ĉar mi havas malbonan novaĵon.

Kiam HALE kongresis en interreto, kiam la aferoj SAT-HALE estis preskaŭ en la paĝoj de Historio, SAT, denove, surprizas nin kiam, kontraŭlege, eksigas HALEn el sia sino.

Mi bedaŭras, ke SAT estas kopio de la Inkvizicio, tamen malbona kopio, kaj kiam ne ekzistas respekto pri sia propaj leĝoj, kiam SAT atakas siajn leĝojn, kiam SAT ne respektas sian Statuton, oni certe povas kompreni, ke mi ne havas bonan paroladon kaj aperas situacio tia, ke HALE ne plu apartenas al SAT, ke SAT eksigis al HALE…, sed la estraro de HALE ja apartenas al SAT. Cu oni komprenu tion? Tio signifas ke SAT eksigas HALEn, sed ĝi ne eksigas la estraron de HALE.

SATeH povas aparteni al SAT, same kiel HALE, sed la diferenco estas granda ĉar la tuta estraro de HALE apartenas al SAT, malkiel SATeH, ĉar la Prezidanto de SATeH ne apartenas al SAT.

Kiel oni povas kompreni, tio estas kampanjo de SAT kontraŭ HALE, la progresema Asocio.

Sed ne ĉio estas malbona novaĵo, ĉar HALE kongresis kaj jam aperis en ***Kajeroj*** la nova HALE kiel progresema asocio. En HALE ne ekzistas inkvizicio, HALE estas insulo de liberpenso kaj ĝi estas kontraŭ *la penso unika*.

Antaŭ du aŭ tri numeroj aperis artikolo pri *Mitoj de la Intercivitana Milito,* kaj en tiu numero aperas artikolo *Kontraŭ la mitoj de la intercivitanta milito*. Mi bedaŭras, ke ***Sennaciulo,*** kiu devas esti organo de liberpenso, cenzuris artikolon de la Prezidanto de HALE. Se la prezidanto de SAT sendus artikolon al ***Kajeroj el la Sudo,*** tiu ĉi artikolo aperus. Se ili estas vere progresema viroj kaj virinoj, ili devas pripensi pri tio ĉio.

En la venonta numero ***Kajeroj*** publikigos la aferon SAT-HALE, se ***Sennaciulo*** aŭ la Prezidanto de SAT volas kontraŭargumenti nian pozicion, la paĝoj de ***Kajeroj*** estas malfermitaj por ili. Ĉar HALE defendas liberpenson eĉ kiam oni kritikas HALEn.

La estraro studas la programon *Pioniroj*. Tiun programon mi sendis al la Prezidanto de Valencia Esperanto Federacio, kaj li konsentís. Kiam mi estis Prezidanto de VEF mi proponis la programon *Pioniroj,* kaj en tiu ĉi momento VEF kaj HALE povas kunlabori en ĝi.

*Johano Antono Cabezos,*
*prezidanto.*

# Profilo de imitinda esperantisto

*Ĉi tiu intervjuo okazis kelkaj monatoj antaŭ la forpaso de nia kamarado José María Bernabéu Franko, je la 22-a de aŭgusto 2003.. Mi kredas, ke la plej granda omaĝo al li estas rakonti al vi momenton, kiu mi kunvivis kun li, kiam li jam estis malsana, kaj mi iris viziti lin. Mi registris la koversacion, celante fari intervjuon al vivriĉoplena esperantisto, sed diri intervjuo estas diri tre malmulte. Fakte estis konversacio amika.*



***Kiam vi esperantistiĝis?***

Je la jaro 1937, dum la milito.

***Kiom jaraĝa vi estis?***

Deksep.

***Ĉu deksep? Do vi naskiĝis je 1920. Kaj kial vi decidis iĝi esperantisto?***

En Kaljoso jam ekzistis grupo, sed kiam la milito ekis, ĝi malaperis. Sed mian urbon atingis du esperantistoj, kiuj fuĝis el Germanio, Nablus kaj Pablus. Ili vendis aferojn por povi manĝi. Kaj kiam ili venis en Kaljoson, ili vidis la verdan stelon de Esperanto en angulo strata, je la eniro al la urbo. Ili estis surprizitaj, kaj demande-demandante, oni kondukis ilin al S-ro Francisco Zaragoza. Do, ili decidis resti en Kaljoso, ĉar estas esperantistoj, kaj sentis sin hejme.

Tiutempe Kaljoso perdis homojn, ĉar milito komencis, kaj ĉiuj iris en la militon. Sed onklo de mia edzino revenis hejmen. Liĵus bicikladis tra Eŭropo, kaj restis aparte en Svedio, kies lingvon li lernis dum la ok monatoj, kiujn li restis ĉe lokaj esperantistoj. Ĉar li bicikladis tra Eŭropo per Esperanto, kaj diris, ke estis multe da esperantistoj en du landoj, tiutempe: en Svedio, kaj en Nederlando. En Nederlando, li diris, estis malfacile paroli laŭte en Esperanto, kaj ke neniu respondis! Estis multe da intereso por nia lingvo en tiu lando. Je la fino de la milito, svedoj gastigintaj mian boonklon venis en Kaljoson. Jam komencis tiam nova metio ĉe ni, *interpretisto hotela*, kaj mia onklo gajnis postenon tian. Ĉar neniu alia regis la svedan en la urbo, oni serĉis mian onklon, kaj li vidis, surprizite, ke temis pri liaj du antaŭaj gastigantoj. Kun ili venis filino, kaj mia boonklo kaj ŝi *ekkomprenis* unu la alian. Jarojn poste, la filino kun sia filo venis viziti mian boonklon, kiu tiam laboris en Granado, kaj tiu filo tre multe

amikiĝis kun la filino de mia boonklo. Ili daŭrigis la amikecon perletere kaj poste ili geedziĝis kaj reiris en Svedion kiel geedza paro.

En la jaro 1932 ekestis la Grupo de Esperanto de Kaljoso, kaj venis S-ro Francisco Zaragoza. Kiam la Intercivitana Milito komencas, la grupo disiĝas. La germanoj venas en Kaljoson en 1932, kaj estas grupo de Esperanto de la 1932 al 1936. Unu el la germanoj foriris. La alia, Karlo, jam laboris ĉi tie, ĉe oficejo, kaj oni jam konsideris lin kiel normalan urbanon ĉi tie.




***Sed dum la milito kio okazis al la* Grupo de Esperanto de Kaljoso*?***

Ĝi fakte malaperis.

***Kion faris S-ro Zaragoza?***

Li malaperis. Oni scias, ke dum milito homoj malaperas, kaj post la milito kelkaj reaperas. Do ne plu estis grupo de Esperanto.

***Kio, do, okazis pri Esperanto en Kaljoso dum la milito?***

Nu, mi estis deksepjaraĝa knabo, kaj estis ankaŭ *Pepe*, la fratoj Marko Boteljo, Roko kaj Antonjo …, ni estis kvar aŭ kvin. De la antaŭa Grupo kelkaj daŭrigis kaj kelkaj ne daŭrigis pri Esperanto. Ĉar estis tempo de milito, kaj la devoj ne estis multaj, ni renkontis ĉiun vesperon celante lerni kaj praktiki Esperanton.Ankaŭ estis kelkaj *eternaj komencantoj*, kiel Roque Salinas kaj *Ĉapelo*, kiu komencis lerni Esperanton multe da fojoj…

Ni skribis leterojn eksterlanden, kaj Paŭlo Ŝalmel' korektis miajn leterojn sendotajn, kiujn mi portis al li, al la Kazino de Oriŭelo, kien mi promenis, somere.

Multe da jaroj poste, dum kongreso de SAT en Parizo, Paŭlo Ŝalmel parolis bone kaj longe, kaj post sia parolado li kaj mi renkontis denove, kaj parolis kaj parolis ĝis noktotempo.

***Sed vi diras, ke en tiu tempo vi aĝis 17jarojn…, tamen vi estis ĉi tie, laborante kaj lernante Esperanton… Kiel vi sukcesis ne esti rekrutita iri en militon pafi?***

Jes, finfine mi iris en la militon, kaj mi estis en Terŭel'.

***Terŭel'! Vi estas bonŝanca ne morti en tiu terura batalo!***

Nu, oni vokis en la armeon homojn pli kaj pli junajn kaj pli kaj pli maljunajn samtempe, diversajn kontingentojn samtempe, do mi, deksepjaraĝa, estis kune kun trideksepjaraĝuloj! Ĉar estis tiom da mortintoj en nia flanko, oni sendis nin anstataŭi la mortintojn. Sed kiam ni atingis la batalfronton, la afero jam estis finiĝinta. Ni vidis la urbon ĵus fronte al ni, sed ni ne povis iri en ĝin. Franko ne daŭrigis la batalon al ni, sed li iris flanken, al maro, kaj li dividis la zonon respublikan po du partoj. Tiam, oni demandis, kiu deziras eniri la *Popolan Lernejon pri Milito*, en Valensjo, por iĝi oficiron, kaj multaj el ni levis la manon. Sed estis ekzameno, kaj nur superis ĝin du: *maljuna* Ludoviko, kaj mi.

***Ĉu maljuna? Kiom jaraĝis li?***

Ludoviko estis 32jaraĝa, kaj mi estis 18. ☺

Do, ni sukcesis nian ekzamenon, kaj oni ordonis al ni, ke ni iru al Valensjo. Do, ni perpiede iris. Iom post iom, ni promenis, tranoktis en urbeton, kaj la alian tagon venis ni en la urbon. Kaj en Valensjo, denove ekzameno por eniri la *Popolan Lernejon*, ĉar multaj deziris studi anstataŭ pafi en la fronto. Kaj en tiu ekzameno, mi restis sola.

***La* maljuna *for!***

Jes, sed li iris de tie al sia hejmo, ĉar la fino de la milito venis baldaŭ.

***Kaj vi restis tie por iĝi leŭtenanto.***

Jes, mi studis dum du monatoj tie: balistikon, geografion, matematikon... Mi devas diri, ke mia kono de tiuj aferoj ne estis inter la plej saĝaj en tiu klaso. Kompreneble, preskaŭ ĉiuj estis pli aĝaj ol mi. Tio estis je 1939. La 28-an de aprilo, ni tagmanĝas kiel kutime. Preskaŭ je la fino de la manĝado, la Kapitano Direktoro de la Lernejo leviĝas, kaj parolas al ni: *Bone, amikoj! Tio ĉi jam finis. La milito jam finiĝis. Koran dankon al ĉiuj. Tiuj, kiuj volos, povas iri hejmen. Tiu, kiu volos, povas resti. Ĝis al ĉiuj!*

Kiam ni venkis nian surprizon, la silento eka rompiĝis, kaj ĥaoso venis per tiom da homoj irante tien kaj reen. Kelkaj iris al siaj antaŭaj destinoj koletki siajn aferojn, kaj aliaj reiris hejmen.

***Marko Boteljo ne estis tie, ĉu jes?***

Ne.

***Eble li estis tro juna por iri en la militon...***

Jes. Li estas unu jaro pli juna, kaj oni vokis lin al armeo je 1942, post la milito.

***Kial, do, li eliris Hispanion?***

Verŝajne, ĉar li estis ano de CNT aŭ politika partio…

***Ĉu vi ankaŭ apartenis al politika partio, ĉu vi havis problemojn kun polico pro tio ?***

Ne, ne, ĉi tie, en Kaljoso ne estis veraj politikaj partioj. Sed tagon mi decidis iri al Francio, tra la montaro. Kaj mi petis amikon certigilon pri maldekstrismo mia. Mi faldis la paperon multe, kaj kaŝis ĝin inter miaj vestoj. Se mi sukcesintus eniri francien, mi ne havus problemon, sed mi estis kaptata de policanoj.

***Kion vi diris al ili ?***

Mi diris, ke mi deziris iri en Francion lerni lingvojn. Sed ili primokis min, kaj diris, ke mi estas komunisto. Do, mi parolis al ili pri Esperanto kaj pri la lokoj, kiujn mi konus tra Esperanto.

***Ĉu vi jam konis aliajn landojn ?***

Ne, sed mi konis ilin per miaj amikoj esperantistoj.


Gvardamar 2002

### *Ĉu ili enkarcerigis vin ?*

Jes, sed nur dum unu monato. Tio estis dum la jaro 1949. Mi estis juna, kaj mi volis vidi tian, kia etoso estis tie, en la karcero de Barselono. Ne estis same iri en kareceron pro krimo, kiel pro viaj ideoj, aŭ pro tio, ke oni kaptis vin elirante fermitan landon. Mi estis dum du semajnoj kun aliaj sep aŭ ok internoj, kiuj tuj nomis min *lokusto*[1], ĉar mi volis *salti montojn* Pirineojn kaj iri al Francio.

La duan semajnoduon mi estis pli libera, sed homoj ne parolis tiom libere kiel antaŭe, ĉar povis esti *spiono* en la granda korto de la karcero. Tamen, mi lernis multe tie, el homoj saĝaj, kiuj estis tie pro siaj ideoj. Sed ankaŭ estis krimuloj, kiuj ade parolis pri siaj krimoj kaj krimetoj. Eĉ estis samseksemulo, kiu rakontis al mi kiel li enamigis viron kaj elprenis tutan lian monon.

### *Tio okazis je 1949 . Vi tiutempe aliĝis al HEF kaj SAT, ĉu ne ?*

Kompreneble, mi jam estis aliĝinta al SAT!

### *Kial vi aliĝis al SAT, estante dikredanto, bonorda homo..?*

Sed mi ankaŭ estis *de SAT!* Mi estis laboristo, mi estis maldekstra.

### *Kiam vi aliĝis al SAT?*

Dum la milito, oni parolis al mi pri SAT. En Valensjo oni eldonis SATan ĵurnalon, ***Popola Fronto***, redaktita de Ludoviko Hernández. Mi ne tre bone memoras la daton, sed mi legos al vi tiun ĉi leteron, datumita la 14-an de novembro de 1937 :

*Karaj kamaradoj: morgaŭ mi sendos al vi la novembran kotizon por* **Popola Fronto** *per poŝtmandato, kiu estas : 5 pesetoj de Antonio Sánchez, c/ Martínez de Asturias, 3; 5 pesetoj de Antonio Marco Botella, kiu vivas en Strato Lenin, 79; 5 pesetoj de José María Bernabéu Franco, Strato Rambla, 24 ; 5 pesetoj de Trinitario Martínez Estañ, strato S. Antonio, 26 ; 5 pesetoj de Roque Salinas Aguilar, kiu loĝas en Strato Sanchís Ramos, 1; kaj 4,70 pesetoj de trilinea anonco en* **Popola Fronto**, *kun la sekvanta enhavo : «Kamarado José María Bernabéu, Rambla 24, Kaljoso de Seguro, Alikanto, deziras korespondi kun kamaradoj de ĉiuj landoj kaj interŝanĝi poŝtstampojn, kartojn kaj aliajn. Nepre respondos».*

### *Vi kun nur 17 jaroj jam ĵetis monon en Esperanton!*

*(Li ridas fiere)* Jes !

### *Ĉu vi ne ankoraŭ havas numeron de «Popola Fronto»?*

Ne. Eble Marko Boteljo havas kelkajn.

Bone, mi estis de SAT de kiam mi estis esperantisto, mi legis la revuon de SAT farita en Hispanio, ***Popola Fronto***, kaj mi daŭre estis de SAT ĝis nun.

Poste venis la milito, mia « vojaĝo al Francio », mia reveno kun halto en karcero, mia edziĝo je 1954... Sed mi partoprenis Kongreson de Esperanto de kiam mi povis.

### *HEF aperis je 1949...*

Jes. Mi aliĝis de la komenco. Mia HEF numero estas la 29-a. Je la jaro 1951 mi partoprenis la Kongreson de Tarrasa. Poste mi iris al tiu de Valensjo je 1952.

[1] *Hispane*, saltamontes, *montsaltulo*.

### *Kioma jaro rekonstruiĝas la Grupo de Esperanto de Kaljoso de Segura?*

Kaŝe. Ĉar ĝi ne estis permesate. Ĉiusemajne kvar aŭ kvin samideanoj renkontiĝis por paroli en Esperanto.

La Grupo venis en lumon, malferme, kiel Grupo de Esperanto, nur kiam Franko mortis. Dum ke li vivis, ni faris nenion publike. Pro timo. Tiuj estis kvardek jaroj *malplenaj* de Esperanto en Kaljoso.

S-ro Francisco Zaragoza venis denove en Kaljoson je la jaro 1955-a. Tamen, li ankaŭ timas, kaj li dediĉas siajn zorgojn al instruado de lingvoj, la franca, la angla..., private en sia hejmo.

Sed kiam Franko mortas, je 1975, ni ĉiuj venas publike kaj li verkis sian ***Perfrazan Metodon***, tradukis kaj verkis abunde pri kaj por Esperanto.

*Ĉi tie la sonbendo ĉe mia bendomaŝino finiĝis, kaj mi ne povas transkribi la ceteran parton de nia rendevuo. Sed ni parolis pli. Ni parolis pri la* ***Renkontoj en Gvardamar' de l' Seguro****, kiujn li kreis kune kun aliaj samideanoj antaŭ multe da jaroj : esperantistoj de Alikanto kaj Mursjo rendevuas tie je la unua dimanĉo de Septembro, kaj li gastigis nin al trinkaĵoj. Ni kutime venas «armigitaj» per sandviĉoj kaj granda emo al konversacio en Esperanto, kaj trapasi agrablan momenton, de la mateno ĝis la vespero. La lastan fojon, kiam li partoprenis, José María jam estis tre malsana, sed tamen li partoprenis amike. Li mem ne povis zorgi pri la trinkaĵoj, kiel li dezirus, sed tion faris lia filo, José Miguel, kaj samideanoj de Alikanto.*

*José María Bernabéu estis tre bona esperantisto, kaj li estis la unua Prezidanto de HALE, kiam ĝi fondiĝis, je 1986. Li estis ĝisosta esperantisto, kaj pro tio li neniam komprenis la problemon, kiu kreis SATeH pri HALE. Li estis katolika, maldekstrulo, kaj esperantisto. Li ĉiam havis dolĉajn vortojn por ĉiuj. Li gasteme ricevis nin ĉe li, kaj ankaŭ venis viziti nin en Mursjo, dum ke li povis. Dum multe da jaroj, li estis kasisto de HALE, sed kiam la problemo estis tiom akra kun la aliaj SATanoj de Hispanio, li deziris esti ekster ĝi. Fakte, li demisiis kiel kasisto pro tio, kaj ni ĉiuj, pro respekto kaj solidareco kun li, ankaŭ demisiis kaj organizis novan balotadon. La alia parto tute ne komprenis tion, kaj rifuzis partopreni balotadon ene de HALE. Poste, li revenis en HALEn, kaj eĉ bedaŭrante la aferon, li restis HALEano. Li ĉiam zorgis pri HALE, kaj nia asocio estis kara al li. HALE estu monumento al José María Bernabéu Franco. Ĝi iĝu heredaĵo lia al Esperanto Movado, kune kun la* ***Renkontoj en Gvardamar' de l' Segur'****.*



Ĉe li, je la 1-a de junio 2002


6 JUNIO 1944 / 6 JUNIO 1984
40-a datreveno de enlandigo en Normandio
DARRYL F. ZANUCK
La tago plej longa
Laŭ la novelo de
CORNELIUS RYAN

# La tago plej longa (ne al milito!)

Hodiaŭ datrevenas la tago, kie usonanoj intervenis sur eŭropan grundon, tiel, ke diktatoro ne regu sur la tuta kontinento. Ili povintus, kompreneble, pensi tiam, ke milito estas malbona, kaj, ke solvo pacema ĉiam estas preferinda, do, kial mortigi sian junularon en sencela milito, se perforto nur kondukas al perforto?

Tamen, ne pensis ili tiel, kaj post kelkaj dekmiloj da mortintoj propraj, usonanoj atingis, ke nek blua nek ruĝa diktatoro superregis la kontinenton Eŭropon.

Oni ne povas ne pensi pri aliaj militoj, kie usonanoj intervenis, kaj eĉ se ili ne ĉiam venkis, ili ja premis tiel, ke la alia parto ne forviŝis la sistemon okcidentan bazitan sur demokratio kaj respekto al homaj rajtoj. Oni diras laste, ke usonanoj ne respektas ilin, sed tio estas troigo demagogia: evidente, kelkaj individuoj ja povas perforti ilin, sed en la entuto, la armeo de Usono estas la plej granda garantio kiu iam ekzistis garantii la Homajn Rajtojn tiel, kiel oni deklaris ilin je la Unuiĝintaj Nacioj je 1948.



La apudaj kadavroj apartenis al soldatoj, kiuj kuŝus multe pli komforte apud amantinoj siaj en Usono. Ne havis ili la ŝancon krii sovaĝe «Ne al milito!», kiel laste oni aŭdis ĉe niaj stratoj. Eble tiuj du kompatindaj soldatoj komprenis pri milito, ĝia ekzisto kaj origino, same malmulte kiel tiuj ruzuloj, kiuj je la krio sensenca «Ne al milito!» kaŝas multe da aliaj sentoj, ne ĉiam konfesindaj.

Estas koincido, ke hieraŭ mortis Ronald Reagan, la homo kiu asertis al Gorbaĉov, en Berlino, ke *tiu muro estas honto por tuta homaro, kaj oni devas nepre malkonstrui ĝin plej eble kiel urĝe.*

Je 1962 oni faris filmon pri tiu evento, kiu rakontis al ni kiom da suferoj kaj malfacilo havis la soldatoj por sekurigi okcidentan sistemon vivi en niaj landoj. Tiel, ke hodiaŭ ni povu akre diri, ke usonanoj estas d*iabloj, kiuj nur nafton deziras forrabi* el lando, kie ili ĵus foririgis diktatoron, kiu ankaŭ mortigis senkulpulojn.

*Olga López*


VEF 2003

12-a Internacia Esperanto-Semajno
de la Kulturo kaj Turismo.
2-9 de Oktobro 2004
SALOU (Tarragona) Hispanujo.
Pliajn informojn vi ricevos de Luis Serrano Pérez
Apartat 423. 08200-SABADELL . Hispanujo
Tel. (+34) 93 727 50 21
luis_serrano@mixmail.com
Faksilo: (+34) 937314111 (ne dum augusto)
http://www.terra.es/personal5/lserrano2003



Majon, la 4-an 2003



# Preter manifestacioj[1]

Dr. José L. Pérez Óvilo

La plej grava kaj terura atenco de la lasta 11-a de marto en Madrido vekas la plej elkoran kondolencon al viktimoj kaj la plej sinceran agnoskon al ĉiu persono, kiu sincere manifestaciis laŭ tuta Hispanio. Tamen, estas mia opinio, ke tiuj, kiuj estas legitimitaj esprimi sian doloron kaj bedaŭron, eĉ sian rankoron kaj koleron, estas viktimoj kaj siaj rektaj familianoj, rajtante la cetero de hispanoj, post montri kaj postuli de la povuloj ilian apogon, denove stari kaj analizi tion, kio okazis.

Sen alporti ion ajn, estas nenombreblaj komentariistoj, kiuj insultis teroristojn, sen kompreni ke, krom difini sin mem, per tio ili montras sian senpovon evidentan kaj tiun de sia registaro, sekve konfirmante la triumfon absolutan de la murdistoj, kaj atingas, ju plian rankoron kaj malamon, pli grandan plezuron al tiuj, kiuj atingis sian celon: en batalo ne estas pli granda senrespondeco kaj naiveco ol montri tion kaj malforton. Kian sencon havas voki murdistojn kaj teroristojn al tiuj, kiuj jam diras, ke ili estas, escepte agnoskon apartan de la propraj mankoj?

Kia estas la senco de manifestacio? Neniel montri kontraŭstaro al Terorismo, ĉar la tuta Hispanio scias, ke 40 milionoj da hispanoj kondamnas ĝin, escepte de minoritato tre malgranda konita de ĉiuj: kiam civitanoj elliras surstraten protestante kontraŭ trafiko de drogoj, nesekureco, prostituado aŭ perfortoj, ili neniam faras tion kontraŭ trafikantoj, rabistoj, prostitutoj aŭ perfortantoj, ĉar ili komprenas, ke krimuloj estos ĉiam, sed ili manifestacias kontraŭ la Reprezentantoj de Povo (registaro, institucioj, polico, ĵuĝistoj…), kiuj estas devigitaj solvi tiujn problemojn. Pruvo estas, ke neniam oni alvokis manifestacion kontraŭ rabistoj aŭ perfortistoj, eĉ se civitaneco ne estas purigita de ili.

La senco de manifestacio popola estas, laŭ mia opinio, manifesti la apogon kaj kondolencon al viktimoj kaj postuli Reprezentantojn de Povo, ke ili agu kaj plenumu la funkciojn por kiuj oni nomumis ilin. Malgraŭ tio, la komuna praktiko en Hispanio estas, ke politikistoj, ĉikaze la Registaro, alvoku manifestaciojn kaj, eĉ se ne, ili finfine enkapigu ilin, manipulaciante bonvolemajn civitanojn, kiuj partoprenas en ili, kaj tio estas tute netolerebla, ĉar ĉiuj manifestacioj, laŭ historio, estis alvokitaj kontraŭ la Povo.

La popolo manifestacias ĉar siaj solaj armiloj estas ĉifono kun devizo kaj du bastonoj por teni ĝin; kaj pro tio estas konsilinde malebligi, ke manifestacioj estu prezidataj aŭ alvokataj de siaj naturaj adresatoj, kiuj regante siajn Parlamenton, Juran Ordon, Bultenon Oficialan de la Ŝtato, policon, spionan servon kaj armeon, jam pruvis kaj daŭre pruvas sian notindan neeblecon; ĉar manifestacioj devas denove aparteni ekskluzive al popolo, kiel sola laŭleĝa maniero, se mankas referendumo, kiam la povo bonvolemas toleri kaj permesi ĝin.

*Murcia, je la 22-a de marto de 2004.*

[1]Artikolo malpermesita de la ĵurnalo "La verdad" de Murcia de la Grupo "Correo Vasco".

# La 15a KONGRESO DE VALENCIA ESPERANTO-FEDERACIO

En la vilaĝo Cheste (provinco Valencio, Hispanio), kie Esperanto estas granda multjara tradicio, kaj kun granda helpo de urba registaro kaj gastamo de loĝantoj, okazis la 15a Kongreso de Valencia Esperanto-Federacio, la 29an kaj 30an de majo..

Partoprenis reprezentantoj de la E-grupoj de Alicante, Castellón, Valencia, Oliva, ktp, kaj vizitantoj el Madrido, Francio kaj Niĝerio.

Gravaj eroj de la programo estis la kortuŝaj omaĝoj al nia forpasinta samideano José María Bernabeu Franco, kaj al la elstara esperantisto de la urbo Cheste, Walter Máñez.

Prelegoj, koncertoj, E-kvizo, vizito al la rapid-cirkvito de Cheste (la plej moderna en la mondo), vizito al la lokaj vidindaĵoj, Ĝenerala Asembleo, prezentado de la filmo «La sieĝoj de Malbork» en sia esperanta versio, produktita de Roman Dobrzynski, kaj fine, kiel jam tradicie en ĉiu aranĝo kiu okazas en la Valencia komunumo, gustumado de tipa «Paella», invito de la urbestraro.

*Augusto Casquero*



# Strategiaj proponoj kaj Fundamentoj Ideologiaj por la Ekdekongresa HALE.



**Enkonduko**. De pluraj jaroj jam estas okazintaj, ene de HALE, debatoj pri plej diversaj strategioj aŭ ideologiaj temoj; iufoje per la paĝoj de *Kajeroj el la Sudo*, alifoje per Interreto, letere, aŭ en renkontiĝoj. Lastatempe, domaĝe, kelkaj el tiuj interŝanĝoj de ideoj fiiĝis en akrajn insultajn kverelojn. Tial nepras jam iu ajn iniciato por repacigi la asocion, klarigi aŭ aktualigi ties idearon, kaj fari ĝin efika ilo je la servoj de la laboristaro kaj esperantistaro de ni defendataj. Ĉi virtuala kongreso eble rolos kiel tiun adekvatan iniciaton necesan.

Facile rimarkeblaj inter nia anaro estas la priokupo rilate la utilecon kaj estontecon de nia asocio kaj ĝia presorgano. Mi esprimos ilin jene:

a. Progreso, laborismo kaj sennaciismo.- Ĉu ili plu difinas la karakteron de nia kolektivo? Ĉu tiuj vortoj bezonas redifinojn?

b. HALE kaj la streboj progresemaj de la senpovigitaj klasoj.

c. Kiel apliki niajn sennaciismon, progresemon kaj esperantismon? Ĉu por disvastigi Esperanton ne sufiĉas la neutralaj organizajoj, kiel HEF en Hispanio, kaj por la du unuaj ne estas SAT?

### *Ideologia Fundamento de HALE. Redifinoj kaj nuntempaj aplikoj de ties ĉefaj konceptoj.*

HALE, laŭ sia statuto estas kulturkleriga asocio laborista, progresema kaj esperantista. *Progresema* signifas, ke ĝi *strebas al progreso*; nu, kiel difini la terminon **progreso**? Laŭ PIV, progreso estas la antaŭeniĝo al la supera grado de disvolviĝo, ĉu de individuo, ĉu de kolektivo. Vi kaj mi, legantoj, estas homoj; do; ni ĉiuj apartenas al la plej pritaksindaj estaĵoj el la mondo; sekve estas neakceptebla ia ajn progreso kontraŭhoma, aŭ kiu metas kiel precipecon la akiro de mono aŭ aliaj propraĵoj fare de kelkaj homoj, je la malprofito de la sekureco, liberesprimo, sano, publika partoprenrajto, vivorajto kaj aliaj esencaj aŭ logikaj rajtoj de la ceteraj homoj; ekzemple, kontraŭante la rajton de la laboristoj partopreni flue kaj senpune en la ekonomiaj kaj sociaj decidoj de la entrepreno kie ili laboras; decidoj kiuj povas trafi malutile siajn interesojn. Pruvoj de la progreso estus: ĝenerala sento de bonstato; paco inter sociaj kolektivoj kaj ŝtatoj; kontentiga sanonivelo por ĉiuj; egaleco je ŝancoj por alfabetiĝado kaj kleriĝado; neekzisto de diskriminacioj pro sekso (ĉu kontraŭvirinaj ĉu kontraŭviraj), pro vivmaniero, pro etna aŭ religia apartenoj, pro sociaklasa aneco, aŭ aliaj; ekzisto de libera esprimado de politikaj ideoj aŭ de partopreno en publikaj aferoj; sufiĉa rispekto al la homa vivo; liberecoj de rezidenco, elmigro, familistarigo; eblecoj gajni la necesan monon per laboro stabila, sufiĉe pagata kaj laŭ la propraj kapabloj kaj preferoj kaj ĝeneraligita konfido pri la justa senpartia solvo de la konfliktoj. Certe, la mondskala aplikado de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj de la Unuiĝintaj Nacioj, kune kun tiu de multaj aliaj normoj de la sama institucio estus, ja, progreso; tamen, ni kiel laboristoj (do, anoj de klaso senpovigita), ne estu naivaj, ĉar estis la burĝaro mem tiu, kiu parolis unuavice pri rispekto al homaj rajtoj, ekvilibro inter la povoj de la ŝtato, elradikigo de la turmentoj, universala voĉdonrajto, egaleco inter homoj, kaj frateco; sed post kelkaj jaroj de liberalismaj revolucioj, tiu klaso mem, enriĉiĝinta, kaj ĵaluza pri siaj povo kaj privilegioj ene de la ĵus kreita kapitalisma sistemo; senposedigis la laboristojn kaj humilajn kamparanojn de ties ĵus akiritaj rajtoj voĉdonaj (rezervante tiun rajton nur por la burĝaro tributanta) starigis diktaturojn, kaj sinsekvajn imperiismojn; ĝiŝ la hodiaŭao; kreis kaj kruele defendadis kontraŭhoman ekspluatadon de amasoj de homoj fare de malmultaj kapitalposendatoj, kaj kaŭzis gravajn militojn (ĉu fratecaj?)

La ekskluditaj klasoj nur sukcesis reakiri parte siajn rajtojn kaj povon post longaj luktoj, strikoj, kaj, kelkfoje, revolucioj kolektivismaj. Nuntempe ekstrema mizero trafas pli kaj pli da homoj (frukte de la menciita ekspluatado) transforminte plejparton el la landoj en kvazaŭbananajn respublikojn, danke al la kunkompliceco de ties koruptaj regantoj; kaj helpe de malegala komerca sistemo. Aldone la diriton,

la voĉdonrajto (tie, kie ĝi ekzistas) estas preskaŭ vana: kiucele aŭ kiun baloti se oni ne konas la veron nek siajn verajn interesojn pro la fiagado de la informaj kapitalismaj monopoloj? Kiucele aŭ kiun baloti se, ofte, neniu partio kuraĝas defii per profundaj laborismaj reformoj de la ekonomia sistemo la planojn de la Fonduso Valuta Internacia (FVI), malgraŭ la amasa balotopago ricevita de la popolo? Kiucele baloti se Usono kaj NATO ĉantaĝas per minacoj de militoj arbitraciaj, aŭ puĉoj, al tiuj landoj, kiuj ne submetiĝas servute al la voreco de la multnaciaj entreprenoj, eĉ se iufoje ili estas ege demokratiaj? Rimarku la fifamigajn kampanjojn kontraŭ la demokratie elektita, kaj homrispekta estraro de Hugo Ĉavez en Venezuelo; kaj la fifamigan kampanjon, kiu finis per maljusta kaj kontraŭjura militokupo kaj forrabado de la riĉaĵoj kaj la tero de Irako.

Konklude, malgraŭ la laŭdindaj intencoj de la redaktintoj de la Deklaracio, ĝi restas plu utopia, eĉ en la sindifinitaj demokratiaj plurismaj landoj, pro la malhelpoj de la samaj landoj, kiuj fanfarone defendas ilin, pli ol pro la malhelpoj de la ekzistantaj disktaturoj. La Deklaracio estas ofte misuzata kiel armilon kontraŭ reĝimoj neamikaj de la kapitalismaj potencoj; eĉ se iufoje ili rispektas la politikan plurismon; anstataŭ sincere plivastigi la plenumon de ĝi. **La homo devas esti la kerno de ĉia ajn progresema politiko**, tamen, nur la ekskluditoj, sufiĉe kunordigitaj mondskale, sukcesos kontraŭstari la maljustan sistemon ekzistantan, redistribui homdigne la mondajn servojn kaj riĉaĵojn, kaj respektigi la homajn rajtojn disde la mondo kune kun starigo de aŭtentika globala demokratio. Sed la diriton nur eblus se la ekskluditoj batalus per rimedoj konkordaj kun la homa indeco, eĉ de siaj klasaj malamikoj; alimaniere oni anstataŭus sistemon maljustan por starigi alian ankaŭ maljustan; ni ne alproprigu la etikan kodon de niaj ekspluatantoj, se ni ne volas esti same maljustaj. Ni ankaŭ **rispektu la veron**, kvankam “la vero ne ĉiam estas revolucia”, laŭ la vortoj de la itala komunisto Gramsci; certe la mensogo neniam estas.

Sennaciismo, esperantisto kaj rilatoj kun la naciismoj. Ege mirdinde estas konstati, ke la koncepto de sennaciismo, esenca por SAT kaj ties LEAoj, ne aperas en PIV, tamen SATanoj konstatnte aplikas ĝin. Leginte kelkajn artikolojn kaj aŭdinte kelkajn SATanojn, mi konjektas, ke **sennaciismo signifas tendenco aŭ sento de aparteno al la homaro kaj priokupiĝo pri ties progreso super la postuloj kaj interesoj: ofte stretaj; de oniaj propraj etoso kaj naskiĝolando**. Oni ĉiam naskiĝas homo, tamen la aparteno al iu kulturo, etno aŭ nacio, aŭ al alia, estas tute hazarda, kaj neniel devas kunporti malamikecon al malsamuloj; tute male, la diverseco devas esti konsiderata kiel riĉecon por pli facile trafila vojon al aŭtentika progreso. **La naciismoj, kvankam ofte stretaj en siaj deziroj favori siajn popolojn super aliaj, ne ĉiam estas mal-progresemaj**, ĉar en kelkaj kazoj gentoj de iu nacio estas subpremataj kaj diskriminaciataj de membroj de alia, kiu regas la ŝtaton je sia profito. Mi opinias hipokrita kaj blinda la sintenon de tiuj, kiuj poroponas la sendependiĝon de la kurdoj de Irako aŭ Turkujo, aŭ de aliaj nacioj situantaj en fremdaj landoj, dum ke ili ne povas eĉ aŭdi senkolere ke la vaskoj de Hispanio volas fari referendumon en paco por decidi libere ĉu ili volas esti eŭropanoj hispanaj aŭ nur eŭropanoj suverene regataj de ili mem. Tiu ĉi maltoleremo estas tute la malo de sennaciismo kaj dubinde progresema. Mi kredas, ke **la HALEanoj devas prediki sennaciismon en Hispanio mem, kaj la ceteraj SATanoj faru la samon en siaj propraj ŝtatoj**, se ni volas transformi la koncepton en realajn progresemajn politikojn. Se ŝtato malhelpas pacon, for la ŝtato!

Alia trajto esenca de nia LEAo estas la esperantismo. HALE utiligas la lingvon internacian por klerigi la laboristaron kaj informi ilin pri la diskutoj sociaj, kiuj trafas siajn interesojn. Esperanto estas nutnempe en nia organizaĵo, ĉefe ilo por la fluo de informoj inter la progresemaj kolektivoj laboristaj, kaj ne aĵo pri kio oni devas propagandi; ĉar por la plilingva propagando sufiĉas la neŭtralaj kolektivoj de Esperantujo, kiel HEF en Hispanio; sed mi kredas, ke **por antaŭenigi Esperanton je sia politika akceptogrado en nia lando, necesas ke HEF, HALE kaj aliaj esperantistaj kolektivoj de nia lando (eĉ tiu SATH, kiu kulpigas nin senfundamente je faŝisteco) fondu platformon politikan por esplori la ŝancojn influi la politikajn fortojn kaj sindiktatojn ĉefe tiujn progresemajn, cele al la vasta diskonigo kaj uzo de la internacia lingvo kaj ĝia potenca utileco, ĝian uzon regularn kiel laborlingvon en la Eŭropa Unuiĝo kaj eĉ ĝian oficialigon ŝtatnivele je la sama grado de la hispana.** Tiu, kiu luktas povas malvenki; sed tiu, kiu ne luktas, jam malvenkis.

*José Pina Tuells*

# Kontraŭ *La mitoj pri la Intercivitana Milito*

Lastan jaron oni publikigis la libron ***La mitoj pri la Intercivitana Milito***, kiu havis tri eldonojn dum ses monatoj, kaj pro tio ne strangas, ke ***Kajeroj el la Sudo*** publikigis artikolon pri ĝi. Sekve, post kiam mi legis la artikolon subskribitan de Isabel Acevedo, mi legis la libron.


Manuel Azaña


Fronte al la tezo de Isabel, kiu laŭdas la libron, mi persone opinias, ke tiu libro estas manipulacia je siaj interpretoj kaj je tio, kion ĝi ne diras.

Mi ĉefkomentos unu ĉapitron, *subpremadon*, kaj ĝian tezon pri la *legitimeco de la puĉo*.

La Diktatoreco de Franko ne estis *mola*, tiel, kiel estis tiu diktatoreco de Primo de Rivera, sed je la unuaj jaroj ĝi estis *fera,* kvankam ne tiom dura kaj kontrolanta kiom tiuj komunismaj diktatorecoj estis en tiu epoko. Tamen, ĝi ne estis mola.

Militistoj ribelintaj aplikis teroron por regi amasojn da homoj, kaj tiu teroro estis protektata de la venkanta Hispanio.

Finita la intercivitana milito, la gvidanta frankisma klaso, kaj Franko mem, kredis, ke la murdoj en la ruĝa parto kalkuliĝas je duonmiliono, kaj tiu estimo ebligis la *Ĝeneralan Kaŭzon*, kiu estis procezo, kie oni registris la nomojn de tiuj, mortopafitaj de la ruĝa parto, po ĉiu vilaĝo, urbeto, urbo kaj provinco…, rezultante 87 000 malaperintojn en la ruĝa parto. Lokaj aŭtoritatoj kreskigis la statistikon arbitracie, kalkulante kiel mortopafitojn tiujn murditajn en la franka parto kvazaŭ la ruĝa armeo pafis ilin.



Francisco Largo Caballero.

De tiu Ĝenerala Kaŭzo oni povas eltiri la unuan objektivan fakton: *estis, maksimume, 87 000 mortopafitoj en la ruĝa parto, sed la vera cifero estas malpli granda, ĉar oni kalkulis kiel pafitoj de ruĝuloj tiujn pafitojn de frankistoj.*

Oni scias pri la grado de subpremado dum la Intercivitana Milito en la ruĝa parto, sed oni ne scias pri la grado de subpremado dum la milito en la nacia parto.

Defendantoj de frankismo neis, ke estas subpremado en la frankisma parto je la unua fazo, sed post la publikigo de la libro de Hugh Thomas, ili agnoskis tiun subpremadon, sed ĉiam kiel pli malgrandan ol en la ruĝa parto; sed nun oni agnoskas, ke la subpremado estis similkvanta en ambaŭ partoj.

Se frankismo estintus tiom bonema, mola, kiel Pío Moa deziras pruvi, kial oni faris la *Leĝon pri Respondeco Politika*, laŭ kiu agoj, kiuj dum la Dua Respubliko estis laŭleĝaj (kiel,


Pío Moa.

ekzemple, aniĝi partio politika maldekstra) esis konsiderata krimo juĝenda? Tio signifis, ke hispano, kiu dum 1935 aniĝis PSOE (socialisman partion) kaj malaliĝis la 31-an de decembro de 1935, estis juĝata kiel krimulo post la milito.



Oni ne mencias tiun leĝon, sed oni sciu, ke je la frua postmilito ĝi efikis kontraŭ la "moleco", kiun la aŭtoro prezentas antaŭ ni.

La aŭtoro forgesas, ke la Afrika Armeo alkutimiĝis al malpura milito kontraŭ marokanoj, kie ĉio estis bona, de kripligo al perforto seksa, teroro…, kaj tiujn agadmanierojn oni uzis dum la intercivitana milito la venkintoj.


Alia tezo de la aŭtoro por justigi la puĉon estas, ke *la Respubliko ne plu ekzistis*. Tiu tezo estas falsa, ĉar estis registaro al kiu obeis, almenaŭ, la duono de la armeo, la Civila Gvardio, la plimulto da la Aerarmeo kaj la floto. Malfacile estintus Intercivitana Milito, se la armeo ne estus dividita. Fakte tiu divido estis kaŭzo de intercivitana milito.

Se la armeo apogintus la Registaron, tiu venkintus facile la puĉon, tiel kiel ĝi faris kontraŭ la puĉo de Generalo Sanĥurĥo je 1932, aŭ se la armeo apogintus la puĉon, la respublikaj institucioj malaperintus tiel, kiel okazis per la puĉo de Generalo Pinoĉet. En ambaŭ kazoj ne estis intercivitana milito, kaj en Hispanio ja okazis tio.

Tiu simpla fakto malrajtigas la tezon pri la legitimeco de la puĉo.

Mi finas dirante, ke tiu estas libro legenda, sed ankaŭ kritikenda pro ĝia karaktero manipulacianta, kiu parolas pri homoj bonaj kaj malbonaj, kaj interpretoj kies vero estas dubinda, kiel tiuj, kiujn ni kontraŭstaris sen granda peno.

*Juan Antonio Cabezos Martinez*
*Prezidanto de Hale.*



**Artikolo malpermesita de la ĵurnalo "La verdad" de Murcia de la Grupo "Correo Vasco".**

# Mel Gibson, kiu estas en ĉielo.

*De Dr. José Luis Pérez Óvilo*

***La pasio de Kristo***, de Mel Gibson vekigis absurdan polemikon centrigita pri kies estas la mano, kiu ekzekutis Kriston, kio estas sengrava demando je socio okcidenta, kies ĵuro komprenas, ke filoj ne devas pagi pro la krimoj de siaj gepatroj, tiel, ke ĉu temis pri judoj ĉu temis pri romianoj, tiu estas afero, kiu du mil jarojn poste devas esti definitive finita. La dua argumenta ekskuzo estas, ke tio, kion la filmo rakontas, respegulas tion, kio okazis vere, kio estas tute neakceptebla, ĉar la tuta Homaro scias, ke Kristo estis torturata kaj krucumata, suferoj, kiujn normala persono povas imagi, escepte se la reĝisto de la filmo kaj liaj defendantoj konsideru, ke la publiko povas pensi, ke tiuj turmentoj estas, en si mem, amuzaĵo por tiu, kiu suferas ilin.

Se estas nediskutebla la fakto, ke neniu persono, kiu iris vidi la filmon, povas diri, ke li aŭ ŝi estis surprizita de la dureco de la scenoj, ĉar antaŭe li aŭ ŝi sciis, ke rakontante la dekdu lastajn horojn de Kristo, la filmo centriĝis sole kaj ekskluzive je torturo, sufero, humiligo, ofendo, ĉikano, kaj sekve devige je la kronigo per spinoj, vipado kaj crucumigo, igante temon eksterordinare gravan por milionoj da homoj en bufonan kaj karikatureskan orgion de sango. Nedubeble, se S-ro Gibson luis kelkajn psikopatojn kiel konsilantojn, la filmo estus eĉ pli kompleta.

Gibson uzas, por sekurigi la emocian impakton en la amason, la infaneskan rimedon apelacii al plej malaltaj homaj instinktoj, kiel la ambivalenco sado-masoĥismo: sadismo (impulso kontraŭ aliulo, kiu produktas ĝojon aŭ distron per ties sufero fizika aŭ psika) kaj masoĥismo (impulso kontraŭ oni mem, emante suferon); kaj tiu malestimenda rimedo estis raciigata (psikologia meĥanismo subskonscia per kiu oni klarigas sentojn, emociojn, impulsojn kaj agojn, kiuj alimaniere estus neakcepteblaj por la raciiganto). Ne ekzistas pli bona ekzemplo pri tiu ambivalenco sadomasoĥista ol Mel Gibson najlante brakon de Kristo.

La filmo, kiu alportas neniun novan konon pri la vivo de Kristo, eĉ historian, ricevis surprize, la apogon de la Eklezio Katolika, sen alia ekspliko ol diri, ke "tiel li devis suferi", malplej senchava argumento, se oni ne dubas, ke la vivo de Kristo entenas valorojn multe pli altajn, kiuj indas kompletan alproksimigon anstataŭ reĝojo pri buĉado produktita de homa bruteco. Tamen, mi opinias, ke oni povas eltiri validan sekvon el la filmo, marĝene al la intereso pri ĝia reĝisto, kiu estas, ke (ĵus vidinte homojn katenitajn, pentovestigitajn, memvipadajn, palisumitajn, pikitajn kaj crucumigitajn), la Eklezio kondamnu kaj malpermesu, pro sia aŭtoritato, ĉiujn tiujn agojn sado-masoĥistajn kaj neniigitajn kontraŭajn al racio kaj nekompateblajn el ĉiu ajn vidpunkto kun la instruado de Kristo.

*Murcia, la 12an de aprilo de 2004.*

# Projekto *Pioniroj* de la 21-a jarcento

La institucia modelo de la Esperanto Movado baziĝas je propra modelo de socio de la jarcento 19-a, ĉar ĝi estas ĝeneraliga kaj grupa.

Ĝi estas ĝeneraliga ĉar ĝi agas sur la tuta socio, kaj ĝi estas grupa, ĉar la bazo de la disvastigo de Esperanto estas farata de grupoj.

Nun societo estas faka, ĉar tiusence Esperanto faris kursojn por fakistoj, ekzemple tiuj inStruitaj je fakultatoj de Filologio.

La krizo pri Esperanto venas el tio, ke ne ekzistas fakoj, fronte al tiu oferto, kiu estas ĝeneraliga.

Aliflanke grupoj estas la animo de Esperanto, kaj oni sekve devas redifini la rolon de grupoj de Esperanto.

Pro tio, ni kreas la projekton *Pioniroj*, kies celo estas disvastigi Esperanton per agado gvidata ne de la grupo, sed de la Federacio.

**Difinoj:**

***Pioniro***: pioniro estas tiu persono, kiu organizas aŭ instruas kurson pri Esperanto.

***Ago gvidata:*** estas la protokolo por agado difinita de HALE por disvastigo de Esperanto per la kunlaboro de pioniroj de la 21-a jarcento.

**Kriterioj:**

*1* Prefero pri uniformigo. La pioniro instruu per metodo, gramatiko, vortaro, antaŭe normigita de HALE.

*2* Apogo ekonomia. Tiu pioniro, kiu organizas kurson, ricevos ekonomian subtenon, alidirite *stipendion*, kiu repagas elspezojn pri organizado, transporto, invitleteroj, donacoj kaj tiel plu.

*3* Efiko: Pioniroj ricevu kvanton po lernanto, kiu sukcesas atingi Elementan Gradon.

*4* Faka: La oferto preferinde estu al similcelaj grupoj, kiel naturistoj, joguloj, vegetaranoj, popolaj universitatoj…

*5* Adaptiĝo kaj diverseco: Kiel direktoro kaj organizanto de la kurso, la pioniro povas adapti la kriterion pri prefero pri uniformigo.

**Monsubteno:**

Por pioniroj, kiuj akceptu la kriterion pri uniformigo:

12 eŭroj por organizi unu kurson.

2 eŭroj po lernanto, kiu sukcesu pri la Elementa Grado.

Por pioniroj, kiuj akceptu la kriterion de adaptiĝo kaj diverseco:

10 eŭroj por organizi kurson.

2 eŭroj po lernanto, kiu sukcesu la Elementan Gradon.

Rehavo ekonomia pri la investo:

HALE povas rehavi parton de sia investo per la disvendo de libroj kaj similaĵoj, ĉar uniformigo pri la kurso faciligas kaj centrigas la disvendon de ili.

Devoj kaj rajtoj de pioniroj:

Organizi almenaŭ unu kurson de Esperanto jare.

Plenumi la formularon 1- HALE de lernantoj.

Ricevi monhelpon.

Ricevi edukadon kaj perfektigon pri sia regado de Esperanto.

Ricevi ***Kajeroj el la Sudo*** senpage.

Per ĉi tiu projekto ni celas, ke oni organizu kursojn ekster la sidejo de la grupoj, kaj ke sidejoj de grupoj estu nur por kursoj pri perfektigo.

*Johano Antono Cabezos.*

## Enkonduko en muzikon

Frank Sinatra estis konata kiel *La Voĉo*, pro la kvalito de sia kantado. Li reprezentas popolan kantarton en Usono dum la lasta jarcento, kaj tiu stilo influis la okcidentajn landojn dum la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj de la jarcento 20-a.



Decembron la 12-an 1915 bebo nomumota Francis Alberto Sinatra naskiĝis en Hoboken, Novjerzo. Liaj gepatroj nomiĝis Antonjo Martin kaj Natalja Della.

Kiam li jam dekkvinjariĝis, li forlasis lernejon kaj decidis sekvi la paŝojn de idolo sia, Bing Krosbi. Je 1935 li partoprenis konkurson radian kantante kaj dancante kun aliaj tri homoj. Ili venkis la konkurson kaj ili kreis la grupon *Hoboken Kvar*, kiu sukcesis turneri dum kelkaj jaroj. Aldone, li kantis ĉe kelkaj radiostacioj dum kelkaj jaroj, ĝis lin trovis fama trumpetisto Hari Jakobo, kiu decidis, ke li povus esti bona ĉefkantisto je sia bando *La muzikfaristoj* (The Music Makers).

Sinatra forlasis tiun grupon post sep monatoj, kaj li aliĝis la Orkestron de Sŭing de Tomi Dorsi. Tie *klasika Sinatra* aperis, kaj la idolo Sinatra komencis esti. Je la kvardekaj jaroj li komencis sian *solan* karieron, kaj li komencis havi multe da adoleskantinoj, kiuj amegis lian emocihavajn scenaĵojn kaj unikajn frazigajn kantojn.

La unua sukcesokanto registrita de li datumiĝas je 1939, *Ĉio aŭ nenio ajn* (All or nothing at all), sed ĝi aperis je 1943, nur tri jaroj antaŭ li iĝis aktoro. Inter liaj unuaj filmoj, la plej sukcesa estis *Ankoroj supren!* (Anchors away) kaj *Je la urbo* (On the Town) je 1949.

Je la komenco de la kvindekaj jaroj, li havis problemojn: liaj voĉkordoj estis difektitaj kaj sangis. Ankaŭ lia emocia vivo ŝanĝis akre: li forlasis sian edzinon kaj tri infanojn por stelulino Ava Gardner. Aldone, la roloj ofertataj al li estis sengravaj, kaj li perdis postenon je sia filmokompanio, diskokompanio kaj eĉ lia reprezentanto forlasis lin. Sed Ava Gardner apogis lin, kaj li sukcesis roli je la 1953-a filmo *De ĉi tie ĝis eterno*, obtenonte Oskaron kiel la plej bonan neĉefan rolon. Du jarojn poste li denove sukcesis je *La homo kun ora brako* kaj je 1962 je *La manĉura kandidato*. Same, li rolis aliajn malpli gravajn filmojn *Uloj kaj ulinoj* (1955), *Alta societo* (1956) kaj *Amiko Joey* (1957). Li formis grupon sub la nomo *La rataro*, kiu dekomence celis drinki kaj festumi dumnokte: Dean Martin, Sammy Davis Jr., Peter Lawford kaj Joey Bishop, kaj poste ankaŭ Milton Berle, Shirley MacLaine kaj Tony Curtis. Sed vere temis pri aro da kantistoj kaj dancistoj, kiu performis en teatroj kaj kino, kiel atestas la filmoj *La dekunu de la Oceano, Tri serĝentoj* (1962), *Kvar por Teksasoj* (1963) kaj *Robin kaj la seven ĉapeletoj* (1964), kiuj montris la ĝojon kaj vivostilon festumi tranokte ĝis la mateno.

Sed lia kantista kariero denove naskiĝis je 1953, per Kapitol Rekords. Li havis muzikaranĝiton, Nelson Riddle, kiu produktis diskojn plej popolajn tiam, kiel *Kantoj por junaj amantoj, Afero sŭinga, Venu flugi kun me, Sŭing facila, Je la etaj horoj,* kaj *Kantoj por sŭingaj amantoj*. Dum tiu periodo lia kantstilo disvolvis, kaj ĝi gamis de tristo al facilanimo. Je la fino de la kvindekaj jaroj li denove estis sukcesa kantisto, aktoro kaj negocisto. Li divorcis Ava Gardner-n, kaj post kelkaj flirtadoj, li edziĝis al vidvino de Zeppo Marx, Barbara. Li emeritiĝis je 1971, sed li faris kelkajn kantojn kaj aperis en televido, kaj ankaŭ rolis en filmo, *La unua ĉefpeko*. Li mortis je la 14-a de majo de 1998, kiam li estis okdekdu jaraĝa.

Se vi starigas vian kapon, kiam ĉiuj ĉirkaŭ vi
perdas tiujn siajn kaj kulpas vin,
Se vi povas fidi vin mem kiam ĉiuj pridubas vin,
sed tamen komprenas, ke oni dubu pri vi,
Se vi povas atendi kaj ne laciĝi pro atendado,
aŭ se oni mensogas al vi, vi ne negocu pri mensogoj,
Aŭ kiam oni malestimas vin, vi ne emas malami,
kaj tamen vi ne ŝajnas tro bona, aŭ parolas ne tro saĝe,
Se vi povas sonĝi kaj ne sklaviĝi al viaj sonĝoj,
Se vi povas pensi kaj ne celi viajn pensojn,
Se vi povas renkonti Triumfon kaj Katastrofon
kaj trakti tiujn du mensogulojn same,
Se vi povas elteni aŭdi la veron, kiun vi diris
torditan de ruzuloj por trompi aliajn stultulojn,
Aŭ observi aferojn, por kiuj vi donis vian vivon, rompitajn,
kaj subeniri kaj ripari ilin per malnovaj iloj,
Se vi povas fari stakon kun ĉiuj viaj enspezoj
kaj riski ĝin je unu monerĵeto,
Kaj malgajni, kaj komenci denove je via komenco,
kaj neniam respiri vorton pri via malgajno,
Se vi povas perforti vian koron kaj nervozon kaj tendenon
servi vian decidon multe post tiam,kiam vi jam foriris,
Kaj tiel daŭrigi kiam estas nenio en vi,
escepte de la volo, kiu diras al ili: «Atendu!»
Se vi povas paroli al amaso kaj konservi vian virton,
Aŭ promeni kun reĝoj kaj ne perdi vian komunan tuŝon,
Se neniu malamiko aŭ koramiko povas vundi vin,
Se ĉiuj homoj kalkuletas al vi, sed neniu troe,
Se vi povas plenigi la malperdonantan minuton
per sesdek sekundoj da kurebla distanco
Via estas la Tero kaj ĉio, kion ĝi entenas
Kaj, kio gravas eĉ pli, vi estos homo, filo mia!

*Radjard Kipling*



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO Tfn° (00 34) 658 166 323

Retskribu al jesuo@ono.com

http://www.iespana.es/kajeroj.htm

http://www.gazetoteko.com/kajeroj

## Surprizo en la reto.

From: ronsnafulin@aol.com
Subject: HALE kaj la LEA Komitato
To: jheras1@aliso.pntic.mec.es

Kara Jesuo,

Mi skribas por informi vin ke tre klara plimulto de la LEAoj voĉdonis ke HALE estus eksigite de la LEA Komitato laŭ la «Interkonsento pri LEA-Komitato de SAT».

R. Lynn
Secretario
LEA Komitato

Ni komentos la venontan numeron..

**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: CopyGraph.**
**ISSN 1697-6460**